BEL informas

n-ro 9/2015

la 7an de majo 2015

7 de maio de 2015

UFC estigas Kolekton Paulo Amorim Cardoso

UFC cria Coleção Paulo Amorim Cardoso

Ĝoje ni informas pri la kreo de la Kolekto Paulo Amorim Cardoso, la presita kaj ciferigita bibliografio, en kaj pri Esperanto, de la Universitata Biblioteko. La nomo estas omaĝo al la fondinto de Esperanto-kurso de UFC, al kiu oni ŝuldas la organizadon de la unua ampleksa kaj malofta kolekto, kun eldonoj kiu datiĝas el la malfrua deknaŭa jarcento. Temas pri unika kolekto, kadre de la brazilaj universitatoj.

Com muita alegria informamos sobre a criação da Coleção Paulo Amorim Cardoso, o acervo bibliográfico impresso e digitalizado em e sobre o Esperanto da Biblioteca Universitária. O nome é uma homenagem ao fundador do Curso de Esperanto da UFC, a quem se deve a organização do primeiro acervo amplo e raro, com edições que remontam ao final do século dezenove. Trata-se de coleção única em universidades brasileiras.

Danke al la peno de Prof. Jonathan Smith kaj Prof. Elizabeth Maia, kun zorga kunordigado de la bibliotekistino Josineide Góis, ni kalkulas je raraj verkoj konservitaj, ciferigitaj kaj, kun respekto al kopirajtoj, disponeblaj al publika konsulto. Ne povus esti pli bona maniero festi la kvindekan datrevenon de la Esperanto-Kurso de UFC!

Graças ao empenho do Prof. Jonatan Soares e Prof[a]. Elizabeth Maia, com zelosa coordenação da bibliotecária Josineide Góis, estamos com as obras raras preservadas, digitalizadas e, respeitados os direitos autorais, colocadas para a consulta pública. Não poderia haver melhor forma de comemorar os cinquenta anos do Curso de Esperanto da UFC!

Kun granda ĝojo, **BEL Informas** gratulas ĉiujn! Inkludante Prof. José Leite Jr., unu el la ĉefaj aktivuloj de Esperanto ĉe la universitato kaj elektita de la biblioteko kiel kuratoro de la kolekto.

Com muita alegria, o **BEL Informas** parabeniza a todos! Inclusive ao Prof. José Leite Jr., um dos principais ativistas do Esperanto na Universidade e eleito pela Biblioteca como curador do acervo.

Informis: Prof. José Leite Jr./UFC

Informis: Prof. José Leite Jr./UFC

Esperantista Junularo aktiva en Minaso

Juventude Esperantista ativa em Minas Gerais!

Foto: dum EMEJE…

Foto: … kaj dum CEOMG.

Ĉiujare dum Karnavalo, kiel jam informite pere de **BEL Informas**, okazas la Renkontiĝo de Spiritisma Junularo (EMEJE) en la ŝtato Minas Gerais. Ĉi-jare, la urbo de la evento estis Itaguara, interne de la ŝtato. La evento kunigas spiritistajn gejunulojn el diversaj minasaj urboj celante la kunfratiĝon kaj la studadon de la Spiritisma Doktrino. En tiu renkontiĝo, ankaŭ okazas pluraj metiejoj, kiaj teatro, danco, muziko, evangelioterapio ktp. La ĉi-jara novaĵo estis la aldono de Esperanto inter tiuj metiejoj. Organizita de niaj samideanoj Sarah Monteiro (São Gonçalo do Pará) kaj Ricardo Dias Almeida (Campinas), la metiejo havis entute 20 partoprenantojn. Dume la gejunuloj lernis la bazon de la lingvo kiel ankaŭ ĝian idealon de frateco. Dum la ferma arta vespero, ili kantis la kanzonon “Esperanto” de la esperanta kantisto JoMo.

Tiu metiejo estis tiom sukcesa, ke niaj instruistoj estis invititaj rearanĝi alian eventon: CEOMG (Spiritisma Kunfratiĝo de la Okcidento de Minas Gerais), kiu okazis dum la Sankta Semajno, de la 3-a ĝis la 5-a de aprilo, en la urbo Abaeté. Ĉi-foje, ree aranĝita de Ricardo Dias kaj helpe de Renan Lyra (Rio-de-Ĵanejro), ĝi tiel furoris kiel la inaŭgura metiejo. Ĉeestantoj de la unua metiejo kaj novuloj entuziasmiĝis pri la lingvo kaj ĝia lernado.

Ni esperas, ke tiu laboro daŭre kresku, allogŭ homojn al nia movado kaj inspiru aliajn fari la samon ene de siaj grupoj.

Anualmente, durante o Carnaval, como já informado no **BEL Informas**, ocorre o Encontro de Mocidades e Juventude Espírita (EMEJE) em MG. Neste ano, a cidade-sede foi Itaguara, no interior do estado. O evento reúne jovens espíritas de diferentes cidades de Minas com o objetivo de confraternizar e estudar a Doutrina Espírita, mas também conta com várias oficinas de teatro, dança, música, evangelhoterapia, dentre outras. A novidade deste ano foi a inclusão do Esperanto nas oficinas. Organizada por nossos jovens samideanos Sarah Monteiro (São Gonçalo do Pará) e Ricardo Dias Almeida (Campinas), os 20 participantes aprenderam as noções básicas da língua, e seu ideal de fraternidade. Para encerrar a oficina, eles cantaram a música “Esperanto” do esperantista JoMo no sarau do evento.

O sucesso da oficina foi tão grande, que os instrutores foram convidados a coordenarem outro encontro: a CEOMG (Confraternização Espírita do Oeste de MG), ocorrido durante a Semana Santa, de 3 a 5 de abril, na cidade de Abaeté. Desta vez com nova coordenação de Ricardo Dias e ajuda de Renan Lyra (RJ), repetiu-se o sucesso da estreia. Participantes da primeira versão e os novos mostraram entusiasmo pela língua e seu aprendizado.

Esperamos que esse trabalho continue crescendo, atraia novos esperantistas para o

movimento e inspire outras pessoas a fazerem o mesmo dentro de seus grupos.

Informis: Renan Lyra/BEJO

Informis: Renan Lyra/BEJO

Kontrolu la aliĝilon de la 2-a VINA

Confira o formulário de adesão do 2º VINA

Aliru la aliĝilon ĉe:
https://docs.google.com/forms/d/1yCr5ajqs8Zc5vCxV0hq2YIA6cSQ9nXfwbODNkYaP_Jk/viewform

Ŝatu nian paĝon kaj sciu pli ĉe
https://www.facebook.com/pages/VINA-Vintra-Aran%C4%9Do/811645628915590

BEJO

Acesse o formulário em:
https://docs.google.com/forms/d/1yCr5ajqs8Zc5vCxV0hq2YIA6cSQ9nXfwbODNkYaP_Jk/viewform

Curta nossa página e saiba mais em:
https://www.facebook.com/pages/VINA-Vintra-Aran%C4%9Do/811645628915590

BEJO

Informiĝu pri la 9-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo

Informe-se sobre o 9º Congresso Paulista de Esperanto

Tradicie la Esperantaj eventoj per riĉa programo celas prezenti al partoprenantoj la plurkulturan movadon, kiu ekzistas ĉirkaŭ la lingvo. La 9-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo kun diversspecaj programeroj, ĉefe prelegoj kaj kunsidoj sed ankaŭ koncertoj, kursoj, literatura bazaro kaj similaj, estos ne nur altnivela aranĝo sed ankaŭ bunta arta festivalo.

Tradicionalmente, por meio de um rico programa, os eventos Esperantistas objetivam apresentar a seus participantes o movimento multicultural que existe ao redor do idioma. O 9º Congresso Paulista de Esperanto, com uma programação variada, principalmente palestras e reuniões, e também concertos, cursos, uma feira literária e outros atividades, será não apenas um evento de alto nível, mas um festival cultural.

Tiu kongreso kunigos homojn el pluraj lokoj en agrabla etoso kaj okazos en speciala kongresejo, la muzeurbo Paranapiakabo, fervoja vilaĝo konstruita dum la deknaŭa jarcento ene de la atlantika arbaro. Pro tia natura etoso la vojaĝo al Paranapiakabo fariĝas taŭga por familiaj promenoj, lernejaj ekskursoj, kulturaj aranĝoj kaj kompreneble por nia kongreso.

Este congresso reunirá pessoas de várias localidades em uma agradável atmosfera e ocorrerá em um local especial, a cidade museu de Paranapiacaba, uma vila ferroviária construída no século XIX no meio da Mata Atlântica. Devido a esse clima natural, a viagem a Paranapiacaba se torna adequada para passeios familiares, excursões escolares, eventos culturais e, claro, para o nosso congresso.

La 9-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo okazos en la tagoj 10-11-12a de oktobro 2015. La aliĝilo jam disponeblas en la kongresa retejo - http://easp.org.br/paranapiacaba/

O 9º Congresso Paulista de Esperanto acontecerá nos dias 10, 11 e 12 de outubro de 2015. A ficha de inscrição já está disponível no site do congresso - http://easp.org.br/paranapiacaba/

Venu travivi tiun mirindan feston!

Venha viver esta fantástica festa!

EASP

EASP

26-a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Ĵanejro

26º Encontro Estadual de Esperanto do Rio de Janeiro

http://us9.campaign-archive1.com/?u=f085f921bf70bd12c95b079b4&id=e0a051b666&e=86fc4685a4

AERJ

Krom Macejoo, Kuritibo rajtigita

Kun granda ĝojo ni anoncas, ke Kuritibo ĵus atingis la minimuman kvanton da kandidatoj por nova sesio de la Tutmondaj KER-ekzamenoj.Tio signifas, ke lokanoj rajtos okazigi sesion dum la Kvara Tutmonda KER-Ekzamensesio. Ni memorigas, ke Kuritibo partoprenis en ĉiuj antaŭaj Tutmondaj Sesioj. Gratulon al la kuritibanoj kaj al Ivanĉjo Colling pro la laboro kaj atingo.

BEL Informas

Além de Maceió, Curitiba autorizada

Com grande alegria anunciamos que Curitiba acaba de atingir o número mínimo de candidatos para uma nova sessão mundial de exames segundo o QECR. Isso significa que a população local poderá realizar provas na 4ª Sessão Mundial de Exames de Proficiência Esperanto. Recordamos que Curitiba participou de todas as sessões mundiais anteriores. Parabéns aos curitibanos e a Ivan Colling pela conquista e pelo trabalho.

BEL Informas

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

As Preposições em Esperanto

O estudo completo das preposições é fundamental no aprendizado de qualquer língua. No caso da língua internacional Esperanto, esta pequena obra de Celso Martins facilita este estudo, com explicações claras e objetivas, sempre acompanhadas de

Descubra em sua BEL@Butiko

Fundamento de Esperanto (Edição brasileira)

Chegou a obra fundamental do Esperanto, originalmente escrita em cinco línguas, agora também em Português, na elogiada tradução de Tulio Flores e bela edição da Liga Brasileira de Esperanto! Obra essencial para aqueles que querem um domínio excelente

muitos exemplos que auxiliam a todos, mas especialmente àqueles que aprendem por conta própria. Seu tamanho pequeno auxilia o transporte e manuseio. Adquira agora, por apenas R$ 3,00:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/didatico/as-preposicoes-em-esperanto.html

BEL Informas/BEL@Butiko

do Esperanto como língua e como história. Adquira agora, por apenas R$ 40,00:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/fundamento-de-esperanto-1224.html

BEL Informas/BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva informilo de BEL kaj BEJO sendante novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim bilíngue da BEL e da BEJO, enviando novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel